

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
aprilo-junio 2011

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Dezajn-konkurso—AKTUALA!

Okazas nun internacia konkurso por elekti simbolon por homaj rajtoj. Tri monoprezoj haveblas. Vizitu la retpaĝon www.humanrightslogo.net por vidi diverslingvajn klarigojn kaj informojn, kaj por vidi dezajnojn jam prezentitajn de konkursantoj.

Eĉ por tiuj, kiuj ne planas partopreni, estas havebla io valora: trafaj sugestoj por dezajnantoj de simboloj, ekzemple ke oni faru dezajnojn kiuj diversgrandece bonaspektas—sur leterpapero kaj sur granda flago.

Sonoj kaj iloj

Ĉiuj el ni sendube travivis momentojn dum kiuj ni komparas vorton en Esperanto kun vorto en la propra lingvo. Mi ĵus faris tian komparon, kaj pro tio mi lernis novan vorton en mia propra lingvo, la angla.

Temas pri la vorto “klakilo”. Tiu vorto gravas kiam oni pripensas la muzikon de multaj indiĝenaj popoloj, ĉar inter la ofte simplaj muzikilojn kiujn ili uzas estas diversaj klakiloj. Sed klakiloj povas esti tiom malsamaj, kaj la sonoj kiujn ili produktas estas tiom malsamaj, ke unu vorto ŝajnas al mi nesufiĉa. Laŭ mi (ne-muzikisto kaj muzik-neklerulo), oni facile povas trovi klakilojn de tri specoj, farantaj almenaŭ du sonospecojn.

La iloj kaj la sonoj:

1. Du-pecaj klakiloj, kiuj produktas akrajn sonojn, ofte lignopecoj aŭ ŝtonetoj kiujn oni pare kunklakas. Ekzemploj estas la fiŝformaj lignopecoj kiujn kunklakas aŭstralaj indiĝenoj (probable dum fiŝ-altiraj ceremonioj). Ekzemplo ne-indiĝena estas la ŝnur-ligitaj, lignaj klakiloj uzataj de flamenko-dancantoj.
2. Klakilojn kiuj havas internajn frapilojn oni ofte faras el kavaj kukurboj, ankaŭ el korbetoj, kaj eĉ el argilo aŭ ladskatoloj. Por fari la klakadon, oni enmetas ŝtonojn, bidojn, kaj similaĵojn en la kavejojn por ke ili interne frapu kontraŭ la murojn de la klakiloj. Tia klakilo produktas pli-malpli malprecizan sonon, laŭ la ludmaniero.

3. Klakilojn kiuj havas esteraĵajn frapil-retojn oni tipe faras el sekigitaj, kavaj kukurboj. Oni faras fadenreton laŭ la grandeco kaj formo de la kukurbo kaj surmetas aŭ surfadenigas bidojn aŭ similaĵojn kiel frapiletojn. La sono estas pli preciza se oni subite tiras la fadenreton, pli malpreciza se oni ŝancelas la kukurbon.

Kiuj estas la vortoj en Esperanto por la tri specoj de klakiloj? Ĉu jam ekzistas taŭgaj vortoj? Kiuj ili estas en via denaska lingvo? Mi petas ke vi respondu!

En la angla, la vortoj estas:

1. clapper
2. rattle
3. cabaza (specialigita vorto).

Intermuziko

Mondmuziko, intermuziko, aŭ ĉu simple...muziko? Kiel ajn oni nomas ĝin, ĝxi jam iĝas grava parto de la muzika mondo kaj la muzika industrio.

En la aktuala (majo/junio 2011) numero de la usona revuo Native Peoples (Indiĝenoj), legeblas du artikoloj pri la temo de muzikaj miksaĵoj aŭskultindaj. Unu artikolo pritemas s-ron Brent Michael Davids, usona indiano kiu havas longan muzik-historion kiel prezentanto kaj komponisto. S-ro Davids antaŭnelonge komponis kaj nun prezentas kun orkestro pacocelan muzikoverkaron. Ĉiuj el la verkoj celas kuraci la doloron kaj malbonajn rilatojn inter indianoj kaj ne-indianoj kiuj rezultis kaj ankoraŭ rezultas pro la mortigo de 38 indianoj post ribelo en la ŝtato Minnesota. La komponisto kaj muzikistaro vojaĝos tra tiu ŝtato dum monato por prezentado. La muzikverkoj kombinas la instrumentojn kaj stilojn de okcidenta kaj indiana muzikoj por simboli pacan interagadon.

Alia artikolo en la sama revuo plikonigas la muzikistaron "Pamyua" de Alasko, Usono. Tiu grupo komponas kaj prezentas muzikon kiu estas kunfandiĝo de muzikospecoj aktuale internaciaj, ekzemple ĵazo kaj hiphopo, kun la muzikostiloj de la jupikaj inuitoj. La tri viroj de la muzikistaro estas usonaj, kaj la ina membro estas dana/groenlanda; ĉiuj estas de eŭropa-inuita deveno. La muziko ankaŭ inkluzivas afrikan tamboradon kaj uzadon de diĝeriduo. La grupo faris sukcesoplenajn turneojn en Usono, Kanado, kaj Eŭropo, kaj jam faris kvar albumojn. Ili nun faras videojn por akompani la kantojn.

Evidentiĝas ke kelkaj muzikentuziasmoj jam pretas aŭskulti kaj aĉeti muzikon kiu kunfandas la sonojn de modernaj kaj tradiciaj kulturoj. Se vi estas tia aŭskultanto, vizitu la retpaĝojn de Brent Michael Davids kaj Pamyua; interalie, estas senpage aŭdeblaj ĉe ili "muzikaj buŝoplenetoj".

Kiu...kaj kiu...kaj kiu mi estas?

Oni atentigis min pri la kongresa rezolucio de la 65-a Internacia Junularo-Konferenco de TEJO (2009). Kiam mi legis ĝin, la jenaj frazoj aparte pensigis min:

"...kulturo kaj identeco estas homaj ecoj tro valoroj kaj kompleksaj por esti

karakterizitaj nur per nacia aparteno”.

“...libereco havas multajn vizaĝojn kaj aspektojn. Libereco ankaŭ signifas ke ĉiuj havas la rajton elekti kaj krei siajn proprajn identecojn—identecojn kiuj reprezentas la individuon kaj ne nepre popolon aŭ nacion.”

Ĉiu persono havas sperton pri diversaj identecoj. Ekzemple, oni povas esti filino, patrino, fratino, onkino, amiko, kuracisto, paciento, lernanto, civitano, membro de religio, gento, organizo, kaj tiel plu.

Kiel PIP rilatas al tiu demando en la vivo de ĉiu persono, kaj precipe en la vivo de indiĝeno?

Dum mi faras al vi tiun demandon, mi memoras fotografaĵon kiun mi vidis antaŭ kelkaj jaroj: ĝi montris indianon, verŝajne de la amazona regiono, kiu vizitis Unuiĝintajn Naciojn en Novjorko. Li portis nur banŝorton kaj plumoriĉan kapornamon, kaj mane portis tekono. Li kredeble estis civitano de sudamerika lando, reprezentanto de sia gento, kaj multe pli. Sendube lia preskaŭ indiĝena vestmaniero (aŭ senvestmaniero) atentigis aliajn homojn pri li. Kiuj estis iliaj internaj reagoj al la kombinaĵo de plumoj kaj teko? Kio estas la signifo por ni de persono kiu vivas en du aŭ tri kulturoj, kiu pro tio havas plurajn identecojn, kaj kiu klare videbligas tion? Kio povas esti la signifo de tia persono laŭ la propra takso? Eble la respondoj kiujn ni imagoplene faros povas gvidi nin kiam ni pripensas la demandon en la antaŭa alineo.

Esprimu viajn ideojn! Kundiĝu viajn respondojn! PIP pli vigliĝas kaj pli “vivas” kiam estas inteŝanĝo de vidpunktoj kaj travivaĵoj.

Postvorto:

Estas interese kompari la deklaron de TEJO kun la Universala Deklaro pri Kultura Diverseco de Unesko. Ekzemple, TEJO deklaras ke homoj estas pli ol nacioj, kaj Unesko deklaras ke la grupoj kaj socioj de la homaro estas unikaj kaj multegaj. TEJO deklaras ke ĉiuj havas la rajton krei la propran identecon, kaj Unesko deklaras ke kulturaj identecoj estas pluraj, variaj, kaj dinamikaj, sed ke kultura diverseco ebligas ke homoj pace kunvivu.

Jen pensigaj komparoj de la situacioj de la moderna unuopulo kaj la moderna socio. Kie povas trovi sin la indiĝeno en tia socio? Kaj la esperantisto?

Kunkultivado

Ofta praktiko en la agrikulturo de indiĝenaj grupoj estas kunkultivado de rikolteblaj plantoj kaj arboj. Kvankam pli modernaj agrikulturaj metodoj ne ĝenerale sekvas tiun praktikon, oni nun retrovas kelkajn gravajn avantaĝojn pri ĝi:

---kelkaj arbo pliriĝigas la teron

---kelkaj produktoj de arboj povas esti rikoltitaj, ekzemple, fruktoj aŭ furaĝo

---arboj produktas ombrojn, utila al homoj, bestoj, kaj kelkaj plantospecoj

---miksado de plantospecoj produktas pli da ekonomia sekureco por la bienisto.

Do, ĉu La Kalumeto subite iĝis agrikultura bulteno? Se ne, kial la informoj pri arboj kaj agrikulturo estas interesaj al la legantaro? Certe estas diversaj kialoj; jen du:

---Grava kialo de la malapero de indiĝenaj vivmanieroj kaj vilaĝoj estas ke indiĝenoj ne plu povas efike perlabori por si la vivrimedojn. Oni scias ke tiaj personoj ofte iras al urbegoj kaj tie perdas sian kulturon kaj eĉ sian homan dignon en danĝeraj kvartelaĉoj.

---Perdo de arba/planta agrikulturo signifas perdon ne nur de ekonomia strategio, sed de netuŝeblaj kulturaĵoj, ekzemple, vortoj, konceptoj, kaj kulturaj praktikoj, kiel rikoltofestoj.

Kompreneble, kulturoj kaj lingvoj ŝanĝiĝas, kaj ŝanĝoj ne ĉiam estas perdoj. Tamen, ŝajnas al mi ke la tendenco al la kultivado de unu plantotipo anstataŭ pluraj estas iom kiel la senĉesa farado de unu tasko en fabriko. Ĝi signifas malpli da diverseco, de intereso, de ekonomia kaj kultura integriĝo.

Mi ne estas agronomo (kaj mi esperas ke legantoj kiuj havas tian klerecon, inter aliuloj, prikomentos ĉi tiun artikolon), sed ŝajnas al mi ke la diverseco de arba/planta kunkultivado montras al ni ion ne nur pri terkultivado, sed pri homa vivado, kaj pri niaj bezono kaj kapablo lerni de diversaj kulturoj.

(Informoj de Utne Reader, majo-junio 2011.)

Rakonto: La Origino de la Tabula Muĝosonilo

(Mi ne certas ĉu “tabula muĝosonilo” estas frazeto ĝenerale komprenata de esperantistoj. La ilo estas malgranda tabulo el ligno aŭ osto kiun oni ligas al ŝnuro. Por sonigi ĝin, oni kirlas la tabuleton per la ŝnuro; kiam la tabuleto movas rapide en la aero ĝi okazigas muĝad-sonon kiu en multaj indiĝenaj kulturoj signifas ke grava ceremonio baldaŭ komenciĝos.)

En rokeca loko en montaro loĝis du samnomaj fratoj; ambaŭ nomiĝis Bjamo. La du fratoj edziĝis, kaj ambaŭ el siaj virfiloj nomiĝis Viruimbralo.

Unu tago, ĉiuj plenkreskuloj de la du familioj foriris por serĉi manĝaĵojn. Ili lasis la knabojn en la kampadejo.

Apud la kampadejo de la du familioj loĝis malbonulo kiu nomiĝis Turkuko. Li posedis plurajn, sovaĝajn hundojn. Pro la ega timigeco de la hundoj, neniu kuraĝis aliri ilin.

Turkuko malamis la fratojn Bjamo kaj ĉiam deziris ofendi ilin. Dumspionade, Turkuko vidis ke sia najbaroj foriris. Poste, li aŭdis la ridojn de la knaboj kiuj restis en la kampadejo. Turkuko direktis siajn hundojn al la kampadejo kie estis la knaboj.

La fratoj Bjama kaj siaj familianoj revenis al la kampadejo post sia manĝaĵo-serĉado. Ili surpriziĝis pro tio ke ili ne aŭdis oftan infanan bruon, kaj pro tio ke la knaboj ne bonvenige kuris al ili, kiel kutime. La plej aĝa frato diris, “Mi maltrankviliĝas pro tio ke mi ne aŭdas la voĉojn de la knaboj. Verŝajne, ili forvadis; eble ili mortis pro soifo aŭ pro bestatako.” La pli juna frato ride respondis ke la knaboj silentas nur pro tio ke ili dormis pro la longa atendado.

Baldaŭ la gepatroj trovis la kadavrojn de siaj filoj, malkapablajn je babilado aŭ

kurado. Pro la vundoj de la knaboj, la gepatroj komprenis ke la hundoj de Terkuko mortigis la infanojn. La patrinoj de la du knaboj Viruimbralo ekkriegis. La korŝireco de la vekrioj estis memorige terura.

(Pro memoroj de la patrinaj vekrioj, oni kreis el tabuleto kaj ŝnuro la tabulan muĝosonilon. Per ĝi oni okazigis kaj unuigis la fortan atenton de ĉiuj aŭskultantoj prepare je grava okazontaĵo.)

(Fonto: sacred-texts.com)

La Vesperto—rakonto de la ibo-gento de Niĝerio

Antaŭ multaj jarcentoj, okazis granda milito inter la birdoj kaj la bestoj. La milito daŭris dum multaj jaroj, sed nek unu grupo nek la alia venkis.

Inter ĉiuj la birdoj kaj bestoj de la mondo, nur la vesperto rifuzis aliĝi kun unu el la du flankoj. Li asertis ke li estas neŭtrala. Kiam la birdoj iom progresis en la lukto, la vesperto aliĝis kun ili, sed kiam la bestoj progresis kontraŭ siaj malamiko, la vesperto aliĝis kun la bestoj.

Finfine, kiam la du flankoj interpaciĝis, restis grava demando: Ĉu la vesperto estas birdo aŭ besto? La respondo de la plimulto el la birdoj kaj bestoj estis ke la vesperto estis nek birdo nek besto. Ĉiuj birdoj kaj bestoj malakceptis lin.

Kolera kaj gala pro la malakcepto, la vesperto diris, “La tago iĝos mia nokto, kaj la nokto mia tago. Mi estas ano nek de la birdaro nek de la bestaro.”

(Fonto: Tales of the Land of Death de Uche OKEKE)

Kia estas lingvo?

(el La Biblio de Karen CARPENTER)

Oni ofte rimarkas ke indiĝenaj lingvoj estas izolaj, havas maloftajn strukturojn, ke mankas al ili multaj vortoj utilaj en moderna vivo, kaj simile. Jen vidpunkto de la fama verkisto Karen CARPENTER pri ĉiuj lingvoj de la mondo:

“Homestaĵoj estas kreitaĵoj kiuj serĉas signifon. Krom se ni trovas matricon aŭ signifon en niaj vivoj, ni tre facile senesperigas. Lingvo grave rolas en nia serĉo. Ĝi estas ne nur grava komunikilo, sed ĝi helpas al ni klare esprimi la senkoheran turbuladon de nia interna mondo. Ni uzas vortojn kiam ni deziras okazigi ion ekster ni; ni ordonas aŭ petas, kaj iel, ĉio ĉirkaŭ ni ŝanĝiĝas, kiom ajn la ŝanĝo malgrandas. Sed kiam ni parolas ni kompanse ricevas ion; simple vortigi ideon povas doni al ĝi helecon kaj logon kiun ĝi antaŭe ne havis. Lingvo estas mistera. Kiam vorto paroliĝas, la etereca enkarniĝas; parolado postulas enkarniĝon—spiradon, muskolo-regadon, langon kaj dentojn. Lingvo estas kompleksa kodo, ordigita laŭ profundaj leĝoj kiuj kombiniĝas por formi koheran sistemon kiu estas neperceptebla al la parolanto krom se li aŭ ŝi esta trejnita lingvisto. Sed lingvo havas imanentan neadekvatecon. Ĉiam oni lasas ion nedirita, ion kiu restas neesprimebla. Nia parolado konsciigas nin pri la transcendeco kiu karakterizas la homan travivadon.”

La Nekonata Bestaĉo—kant-rakonto el Niĝerio

(La aŭdantaro kantas la signifomankan rekantaĵon.)

Vi, bestaĉo kiu eltiras plantojn.

Mgba, mgb.

Vi, bestaĉo kiu eltiras plantojn.

Mgba, mgb.

Vi, bestaĉo Kpuruĝarara

Mgba, mgb.

Ĉu vi histrike pintepikas?

Mgba, mgb.

Ĉu vi leoparde ferocas?

Mgba, mgb.

Ĉu vi antilope rapidpaŝas?

Mgba, mgb.

Ĉu vi elefante grandegas?

Mgba, mgb.

Vi, bestaĉo Kpuruĝarara.

Mgba, mgb.

Vi, bestaĉo Kpuruĝakpurara.

Mgba, mgb.

(Fonto: Tales of the Land of Death de Uche OKEKE)

Longe ili vagas....

Mi trovis tre ĉarman libron anglalingvan kiu celas informi infanojn pri la pluvarbaro: *We're Roaming in the Rainforest* (Ni Vagas en la Pluvarbaro) de (s-ino) Laurie KREBS kaj (s-ino) Anne WILSON. Kvankam la libro ne estas en Esperanto, mi kredas ke ĝi estas mencioninda ĉi tie ĉar ĝi tiom alloge kaj informeme prezentas grandegan kaj gravegan lokon, la pluvarbon de la Amazona Rivero.

Per ĉarmaj pentraĵoj kaj rimoj la ĵangalbestoj prezentiĝas, sed ankaŭ per mallongaj informoj. Ankaŭ estas mapo kaj informoj pri la pluvarbo mem, pri ĝia konservado, kaj pri tri el la multaj indiĝenaj grupoj kiuj loĝas en la amazona regiono. Tiu, kiu deziras verki libron por infanoj pri iu ajn temo kaj en iu ajn lingvo, li aŭ ŝi studu la nivelon de talento, la larĝecon de intereso, kaj la emon lerni kaj lernigi kiun oni trovas en *We're Roaming in the Rainforest*..

Antaŭuloj

Grava ero de la vivoj de multaj homoj, inter ili multaj indiĝenoj, estas la honorado de la antaŭuloj. Kiel indiĝenoj ofte havas fortan rilaton kun la loko kie ili loĝas, ili ofte havas ankaŭ fortan rilaton kun mortintaj familianoj. Eble oni povas ĝuste diri ke indiĝenoj, inter aliaj homoj, zorge pritraktas siajn rilatojn kun la homoj, fortoj, aĵoj, kaj simile kiuj ĉirkaŭas ilin. Apuda monto povas esti loko de forto kaj eĉ de vivkomenco. Rakonto aŭ ceremonio povas esti ligilo kun gravegaj vivmanieroj, iloj por ĝuste partopreni la kosmon.

Rilatoj kun antaŭuloj lokigas onin en homa kontinuaĵo. Sed kio estas la signifo de tiu kontinuaĵo? En kelkaj kulturoj, temas pri la esprimo de respekto, kiel alikulturano respektas sciencon, la flagon de sia geptrujo, aŭ simile. Tiu respekto eligas onin el la homa egoismo kaj pensigas onin pri io pli granda ol SI. En aliaj kulturoj, antaŭuloj bezonas aŭ postulas prizorgadon, ekzemple, ofertadon de manĝaĵoj, prizorgadon de siaj tumboj aŭ kranioj, kaj tiel plu. Alia ebleco estas ke oni povas ricevi protektadon aŭ inspiradon per sia rilato kun antaŭuloj, kvankam oni ofte ricevas la favorajn erojn de la rilato nur per la honorado de tradicioj. Do, la rilatoj kun antaŭuloj povas esti pozitivaj kaj povas kontraŭi la senidentecon.

Kontraŭe, en la tradicioj de kelkaj indiĝenaj kulturoj, la antaŭuloj estas malamikaj kaj danĝeraj simple pro sia mortinteco. Pro tio, oni devas tute eviti kontakton kun ili.

La rilatoj inter la vivantoj kaj la antaŭuloj en iu ajn kulturo donas al pensema kaj respektema persono komencopunkton por pripensi la proprajn rilatojn kun persona kaj familia historio.

Kontaktinformoj pri Projekto Indiĝenaj Popoloj

Por peti pli da informoj pri la grupo, esprimi viajn vidpunktojn, aŭ kundiĉi viajn sciojn pri indiĝenaj temoj, kontaktu:

(s-ro) Erik Felker, ejfelker@dslextreme.com

414 E. Cedar Ave., Apt. 11, / Burbank, CA 91501 / U.S.A.